Horizon.taal

Jaargang 38 - nummer 226

Juli - augustus 2007



De hypnotische kracht van het woord (p. 4)

Εσπεράντο

HORIZONTAAL

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w., 38ste jaargang.

Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.

Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd.

Redactie en administratie:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen
tel.: 03 234 34 00
fax: 03 233 54 33
E-post: horizon.taal@skynet.be
Webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl.

Abonnementen: 25,00 EUR

Rekeningen:

t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen: KBC 402-5510531-55
of Fortis 001-2376527-06.

Redactie:

Lode Van de Velde

Medewerkers:

Petro De Smedt, Ivo Durwael, Agnes Geelen, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Emiel Van Damme, e.a.

Verantwoordelijke uitgever:

Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

Advertentietarieven: (alle prijzen zijn in euro)

	1-malig	3-malig*	6-malig*
formaat 1/1:	250	625	1000
formaat 1/2:	150	375	600
formaat 1/3:	110	275	440
formaat 1/4:	80	200	320
formaat 1/6:	55	140	220
formaat 1/12:	30	75	120

* Inlassing van 3x dezelfde advertentie
van een door u drukklaar geleverd exemplaar.

Op deze tarieven geldt het BTW-tarief van 21%.

Kleurtoeslag bedraagt 125 euro per kleur en per inlassing.

De voorbije maanden zijn er heel wat interessante activiteiten geweest. In de eerste plaats komt het grote jubileumweekend van de Esperantogroep van Antwerpen, maar - met het risico iets over het hoofd te zien - ook de iets kleinere activiteiten zoals de Vlaamse Ardennendag, de Esperantoavond voor het opvangcentrum van het Rode Kruis in Brugge, de wandelzoektocht in Gent, de wandeling onder Gent, waren zeer succesvol. En dit is slechts een opsomming van de evenementen waaraan ik zelf deelgenomen heb... resten uiteraard nog de wandeling van de groep van Kalmthout, het jubileum van de groep in Brussel, enz. enz.

Helaas is er van geen van deze activiteiten een verslag binnengekomen; enkel foto's. Ik hoop voor volgend nummer toch wat meer materiaal te hebben. Dus, beste leden, wees niet bang om in je pen te kruipen... ook ik laat mijn teksten nalezen door onze zeer bekwame proeflezer, moest dat de reden tot aarzeling zijn...


Hierbij wens ik alle leden alvast een goede zomer(vakantie) toe, zodat we volledig uitgerust met frisse moed en ideeën aan een succesvol nieuwe seizoen kunnen beginnen!

Lode



INHOUD

Meerdere malen stelde ik vast hoe één enkel woord in een zin of uitdrukking een lezer kan hypnotiseren, een professor kan doen dwalen, een vertaler het Noorden doen verliezen. Nog elke dag, en dat al meer dan dertig jaar, heeft Kjoko wel een lijstje voor me klaar met woorden... die meestal uit een uitdrukking komen, vaak zelfs alleen maar in die uitdrukking gebruikt worden en ... waarbij ik meestal de betekenis van het enkele woord niet ken. Wat is een "ootje"? Veel kans dat ge antwoordt dat dat woord niet bestaat in 't Nederlands, tot iemand op de proppen komt (wat zijn die proppen?) met "In 't ootje genomen worden".



"Floere, het fluwijn" van Ernest Claes werd ooit in het Japans vertaald. Niet rechtstreeks, maar via een Duitse vertaling. Op een bepaald ogenblik schrijft Claes: *Wele heeft haar moedergenot aan 't woelen en stoeien van haar kroost.* (Wele is de naam van een konijn). In het Duits wordt het: *Weele hat eine mütterliche Freude an den Wühlen und Toben ihrer Brut.* Nu is het verhaaltje dat Japanners het verschil niet kennen tussen de klank l en de klank r geen fabeltje! Ook na dertig jaar vraagt Kjoko me regelmatig: of iets *met een lange r* of *met een korte r* geschreven wordt, en vergist zich tussen *fragoj* en *flagoj*. De Japanner ziet *Brut* en ruikt *Blut*! Te zijner ontlasting (?) voeg ik er onmiddellijk bij dat het Duitse boek in fraktuur (Gotisch schrift) gedrukt is... En hij moet dus een betekenis vinden met bloed. Hij komt dan tot (in vertaling) *Zij verheugt zich met een gemoed zoals een moeder, over het feit dat hun bloed wild ruist...*

Denk nu niet dat we zelf, in onze eigen taal, nooit mislezen! Doe eens de test! Maar eerlijk! Met controle, of best met inlezen op band. Lees luidop de volgende tekst uit Floere:

De wind kruipt weg, helemaal, achter de dikke muren van de nacht. De stilte zakt neer over het hoevedak. Floere balt zich klein ineen in de ronde zinking van de dakpan. Hij hoort die stilte. Zijn oogjes spieden scherp omhoog naar waar het zoeven van de boomkruinen was. Floere ziet de verte niet, maar als nu het gevaar nader sluipt zal hij gereed zijn.

O.K. Indien ge *zo-even* gelezen hebt, dan was dat fout! Daarom moet ge nu niet onmiddellijk naar de dokter of de psychiater lopen. Ik deed de test in twee universiteiten, bij studenten Germaanse, en 90% las ook *zo-even* in plaats van *zoeven*. De zin is in orde, althans voor mij, een beetje elliptisch (zet "gebleven" tussen boomkruinen en was). Even voordien was er het zoeven van de wind in de boomkruinen, nu is het doodstil... waar is dat zoeven gebleven? De Duitse vertaler was ook gehypnotiseerd door die "zo-even" die er niet staat, en moet absoluut een zin hebben met soeben: *Seine Auglein spähen scharf empor nach dem, was soeben von den Baumkronen kam.*

Een mooi voorbeeld van de hypnotische kracht vond ik in een vertaling van "De Pastoor uit den Bloeiende Wijngaard" van Felix Timmermans. Het werd in het Duits vertaald door een Vlaming, die min of meer gedwongen na de eerste wereldoorlog betere oorden opzocht en naar Duitsland trok. Een ideale vertaler dus, want waarschijnlijk (bijna) even goed thuis in beide talen. Te goed thuis zelfs in zijn nieuwe huis- tuin- en keukentaal (hij was met een Duitse gehuwd) want als hij leest: *In Afrika (is*

de lucht) rot .... dan kan hij er niet aan weerstaan om het *rot* in het Duits i.p.v. in het Nederlands te lezen. Hij vertaalt dan ook: *in Afrika rot*. Ik vond de fout omdat Kjoko mij vroeg waarom de lucht in Afrika rood is. Voor de dures-de-comprenure, het gaat hier over *putra* en *ruğa*.

Soms spelen de ogen van de lezer ook haasje-over. Lees en vertaal:
Floere doodt Zwinge de wezel, met zijn wijfje, en als hij op een avond Vratte de das aanvalt, vlucht deze juist bijtijds in zijn hol onder de wilgestruik, waar Floere hem niet aan kan.
Als ge, zoals de Duitse vertaler, iets hebt in de aard van: *wo Flure ihn nicht fassen kann* dan zit ge weer eens fout! Er staat immers niet: *waar Floere niet aan hem kan*! Er is een groot verschil tussen *aan iemand kunnen* en *iemand aankunnen*. Toegegeven, *aan* en *kan* zou in één woord geschreven moeten staan, maar het staat ook in twee woorden in het origineel.

Nog eens naar Floere:
En aldoor weet Floere dat hij hier ingesloten is, dat er hier perikelen zijn die buiten zijn belevenis en ervaringen staan, en tweemaal loopt hij terug naar het holletje in de schuurpoort, of het er nog is.
Een mooie zin, met een - voor ons - duidelijk einde, ondanks de opeenvolging van vijf éénlettergrepige woorden (wat stylistisch meestal afgekeurd wordt). Maar het drukt zo kernachtig uit hoe bezorgd Floere is, hoe bang hij is dat hij in geval van nood niet meer zal weggeraken. Van het grootste belang is dat holletje! Wie een kat heeft weet dat ook die graag heeft dat er een holletje (open deur) blijft als ze binnen slaapt! Maar de zin is elliptisch (en stylistisch maar goed ook!) want betekent: om te zien of het er nog is. Voor iemand die een taal niet door en door kent is zo een ellips bijzonder gevaarlijk. En inderdaad, de Duitse vertaler wist er geen blijf mee... en heeft dat stukje dan maar gewoon weggelaten.
Und stets ist ihm bewußt, daß er hier eingeschlossen ist, daß es hier Gefahren gibt, die ausserhalb seiner Erlebnisse und Erfahrungen liegen, und zweimal läuft er zurück zum Loch in Scheunentor...
Dat geeft dan aanleiding tot ernstiger fouten verderop.

Als slot nog even naar de Pastoor. De pastoor heeft voor een bezoeker een glaasje wijn uitgeschonken, en als zijn bezoeker, de horlogemaker, zijn glas uitheeft, gebeurt het volgende:
"Hij smaakt naar nog?" zegt de horlogiemaker, zijn glas vooruitschuivend. (hij = de wijn).
Ik vind het mooi dat Timmermans een vraagteken zet achter een bevestigende zin. Inderdaad het is een manier om te zeggen: schenk nog eens in! Ik wil nog wat... Eigenlijk is het dus wel een vraag. Maar de zin is een uitdrukking, die men maar begrijpt als men ze kent: "naar nog smaken" Volgens vD een belgicisme voor "het smaakt naar meer". Voor de Duitser geen probleem, ze bestaat immers ook in het Duits:
"Er smeckt nach mehr!" sagte der Uhrmacher und schob sein Glas vor.
Perfekt vertaald, al schrijft de gedisciplineerde Duitser een uitroepteken, en gebruikt hij de verleden tijd. Voor een Japanner vormt de uitdrukking een onoverkomelijke hindernis! Ik vermoed dat hij in plaats van *nach* gelezen heeft *nicht*, ... en in plaats van *vor* waarschijnlijk *vorne*? Hij komt tot zowat het tegengestelde van wat er staat: *Hij laat zeer overvloedig een nasmaak. De uurwerkmaker, zo zeggend, duwde zijn glas naar voor weg.*

Verschillende keren heb ik het meegemaakt dat een professor Japans met een zeer spitsvondige uitleg kwam voor een Japanse zin... maar dat (dat weet ik maar dank zij mijn wandelende woordenboek!) hij in feite gewoon verkeerd gelezen had, en gehypnotiseerd was door één of ander woord.

p.d.s.

Fine de 2002 Mireille Corobu metis en interreta forumo* demandon, kiu ofte leviĝas, kiam oni prezentas Esperanton al grekoj, nome ĉu en ĝia vortprovizo troviĝas grekaj vortoj, kaj kiom multaj. La respondo al la unua parto estas klare jesa - oni pensu nur pri «kaj»; al la dua parto tamen oni ne povas respondi per simpla cifero, eĉ proksimuma, kaj el la sekvanta analizo evidentiĝos kial ne :

1. Ekzistas en Esperanto amasego da vortoj kiujn kreis modernaj (t.e. renesancaj kaj postaj) kleruloj, ĉu en la de ili uzata ĝis antaŭ 150 jaroj latina, ĉu en la modernaj fontlingvoj de Esperanto mem (t.e. en la franca, germana, angla ktp.) surbaze de grekaj radikoj, sed kiuj ne jam ekzistis en la greka (kvankam ili plej ofte estis poste alprenitaj ankaŭ en ĝin). Mi pensas pri vortoj kiel "termometro" (el la grekaj θερμός = varma kaj μέτρον = mezurilo), "mikrobo" (gr. μικρός = malgranda + βίος = vivo), gramofono (gr. γραμμή = linio + φωνή = voĉo) k.s. Kreado de tiaj vortoj daŭras ĝis nun, kvankam plej ofte surbaze de vorteroj jam uzataj en la internacia scienc-teknika terminaro: ekz. pri la vortoj "magnetoskopo" aŭ "falokratio" oni povas argumenti ke ili estis faritaj ne rekte el la grekaj vortoj μαγνήτης = magneto kaj σκοπέω = rigardi, aŭ φαλλός = faluso kaj κράτος = regpotenco, sed el la jam antaŭe pruntitaj vortoj "magneto" kaj "faluso" kaj el la internacie konataj vorteroj "skop-" (de teleskopo, mikroskopo k.s.) kaj "krati-" (de "demokratio", "aristokratio" k.s.).

La "ekstera" limo de tiu vortoklaso estas iom malpreciza: ja preskaŭ ĉiuj tiaj vortoj estas enlaseblaj en Esperanton konforme al la "dekkvina regulo". En la komuna (nefaka) lingvo sentiĝas ia rezistemo kontraŭ tiu inundo: neniu diras "oftalmologo", kie simpla "okulisto" sufiĉas. Sed ĉu iu diras "renisto" anstataŭ "nefrologo"? Kaj kion fari pri "otorinolaringologo" - ĉu "nazorelgorĝisto"? (Skribinte tion, mi tuj ekaŭdis voĉon en la kapo dirantan «kial ne?»). En la faka lingvo, la inundo de grekdevenaj terminoj ŝajnas neevitebla; ankaŭ tiuj naciaj lingvoj, kiel la germana aŭ la nederlanda, kiuj komence provis rezisti, dirante ekzemple "Sauerstoff" aŭ "Wasserstoff" anstataŭ oksigeno kaj hidrogeno, tamen cedis antaŭ "Oxyd" aŭ "Hydrogenation"...

Se kalkuli ĉiujn tiujn vortojn kiel "devenantajn el la greka", tiam la procento de grekdevenaj vortoj en Esperanto certe montriĝos tre granda. Estas tamen diferenco inter la "grekeco" de vorto kiel "hidrogeno" (cetere misformita; ĝi devintus esti "hidrogono", kio ja signifas "akvo-naskanto", dum "hidrogeno" signifas laŭvorte "naskita el akvo"; sed Lavoisier ne scipovis la grekan ĝis tia nivelo de subtileco, kaj ŝarĝis la francan per tuta familio da simile misformitaj vortoj, "pathogène", "cancérigène", "électrogène", k.s.) kaj de vorto kiel "kaj"...

2. Duan klason da grekdevenaj vortoj konsistigas tiuj, kiujn la latina aŭ la modernaj fontlingvoj de Esperanto pruntepreni el la greka, kie ili jam ekzistis, ĉu en la sama senco, ĉu en senco pli vasta aŭ pli "komunuza". Mi pensas pri vortoj kiel "liro" (la muzikinstrumento, el kiu devenas - jam en la greka - la adjektivo "lirika"), "poeto" ("poemo", "poezio"...), "dramo", "teatro", "filozof(i)o", "geometr(i)o", "kubo" (origine signifanta "ĵetkubo", sed akirinta jam en la greka sian geometrian sencon), "sfero" (origine "pilko"), "akso" (origine "akso de rado") k.s.

Ene de ĉi tiu klaso oni povas distingi subklasojn:

a. Vortoj esprimantaj specife grekajn nociojn : ciklopo, centaŭro, muzo, draĥmo, obolo, hekatombo...

b. Vortoj konscie kreitaj (aŭ konscie prenitaj el la popola lingvo kaj ekuzitaj en specifa



scienca aŭ filozofia senco) de grekaj pensuloj, kaj poste enprenitaj en la latinan, kaj (tra ĝi kaj la modernaj fontlingvoj) en Esperanton. Temas ĉefe pri terminoj filozofiaj, filologiaj, astronomiaj aŭ geometriaj : harmonio, fenomeno, hipostazo - epiteto, perifrazo, idilio - eklipso, planedo, kometo - centro, poligono, parabolo...

[Parenteze pri ĉi lasta vorto: en la modernaj eŭropaj lingvoj ĝi estas uzata en du sencoj ŝajne tute senrilataj, nome (1) religi-instrua fablo, de Jesuo mem aŭ laŭ lia modelo, kaj (2) speco de koniko (el kio venas la senco verŝajne plej ofta en la nuntempa ĉiutaga franca, t.e. "satelita anteno"; mi povas imagi junan kateĥizaton demandanta la pastron ĉu Jesuo predikis televide!). La origina senco de la greka vorto estis "apudmeto", "komparo", el kio venas tute nature la religia senco; la geometria senco klarigeblas el tio, ke se oni difinas koordinatojn laŭ la granda akso de koniko kaj la tanĝanto je ties pinto, ĉe parabolo y*y egalas a*x, dum ĉe elipso aŭ hiperbolo (greke ="manko" resp. "troo", kp. la retorikan sencon de la samaj vortoj) ĝi estas malpli resp. pli granda. Cetere, ankaŭ "parolo" devenas - tra la franca - de la sama greka vorto!]

c. Vortoj komunuzaj, enprenitaj de la greka en la latinan kaj tra ĝi kaj la modernaj fontlingvoj en Esperanton, kune kun la koncerna nocio : leono, disko, horo, aero(!), eĥo, purpura, muziko, tragedio/tragika, komedio/komika, heroo, teatro, dramo...

d. Vortoj esprimantaj specife kristanajn nociojn kaj transprenitaj de la aliaj eŭropaj lingvoj kune kun kristanismo : evangelio, eklezio (origine "asembleo"), anĝelo, bapti, apostolo, episkopo (origine "superrigardanto" - la dua elemento estas la sama kiel en "teleskopo"), martiro (origine "atestanto"), eŭkaristio (origine "dankesprimo"), monaĥo (origine "solulo"), ortodoksa (origine "ĝustopinia"), katolika (origine "universala"), herezo ... kaj kompreneble, ankaŭ la vorto "Kristo" mem (origine "ŝmirito, sanktoleumito").

3. Ekzistas kelkaj - malmultaj - vortoj de hindeŭropa deveno, kiuj pro tio (kaj ne pro reciproka prunto) aperas kaj en la greka kaj en la latina, germana aŭ rusa/pola, tiel ke oni ne povas diri el kiu unuopa lingvo ili estis prenitaj en Esperanton. La plej evidenta ekzemplo estas la numeraloj : ĉu "du", "tri", "ok" kaj "dek" devenas de la grekaj "δύο, τρία, οκτώ, δέκα", aŭ de la latinaj "duo, tria, octo, decem" - se ne mencii ankaŭ la rusan "три"? Demando stulta, se tiel metita : Zamenhof evidente profitis tiun antaŭekzistantan similecon, kaj elektis siajn formojn konforme al ĝi. Same okazas pri "nun", trovebla samforme en la greka, sed ankaŭ en la latina (nunc) kaj en la germana

(nun); pri "mi", trovebla en tre simila formo en verŝajne ĉiuj hindeŭropaj lingvoj; pri "en", trovebla samforme en la greka, sed ankaŭ en la franca, kaj en tre simila formo ("in") en la latina, angla kaj germana; pri "patro", identa ("πατήρ, pater") kaj en la greka kaj en la latina; pri "dekstra", kiun Zamenhof evidente prenis el la latina "dexter", sed kiu ekzistas en la greka en la formoj δεξιός kaj (arĥaisme kaj malofte) δεξιτερός; pri "plata", parenca al la greka πλατύς (= larĝa); pri "bovo", parenca al la greka βους (kaj, nekredeble, al la germana "Kuh" = angla "cow" - sed tio estas alia rakonto...), sed fakte prenita el la samfamilia latina "bos", gen. "bovis"; kaj pri pluraj aliaj.

4. Krom tiuj klasoj da vortoj grekdevenaj sed (eŭrope) "internaciaj", ekzistas ankaŭ kelkaj radikoj verŝajne pruntitaj rekte el la greka, sed ili estas tre malmultaj. Sen vortaro ĉemane (mi verkis ĉi tion dum ferio en somerumejo), mi povas tuj pensi pri jenaj :

- kaj [identa forme kaj sence en la klasika greka]
- osto [greke οστέον/οστούν]
- hepato [greke ήπαρ, genitivo ήπατος, kun komenca (ekde 1982 ne plu skribata, kaj de 2000 jaroj ne plu prononcata) h; "hepatito" estas internacia vorto, sed laŭ mia scio, nur en la greka oni nomas la organon per tiu sama radiko]
- histo [greke ιστός, same kun komenca h; ankaŭ ĉi-kaze, derivaĵoj (histologio, histamino) ekzistas internacie, sed la radikvorto mem ne estas uzata ekster la greka]
- mjelo [greke μυελός, kiu signifas kaj "spina cerbo" kaj "ostocerbo", laŭ la lingvouzo rekomendata de Zamenhof sed tro kontraŭa al lingvokutimoj de modernuloj, por kiuj "cerbo" estas unualoke organo de pensado, kaj nur akcesore manĝebla molaĵo ene de la kranio]
- orta [greka adjektivo, origine signifanta "rekte staranta", sed uzata en geometrio en la senco de "orta angulo"; derivaĵoj (fr. orthogonal, orthonormal) ekzistas internacie, sed la radikvorto mem estas uzata en tiu senco nur en la greka kaj en Esperanto, kie ĝi oportune solvas la problemon de la dusenca franca "droit", angla "right" ktp.]
- eposo [ankaŭ ĉi-kaze, derivaĵoj abundas internacie, sed la radikvorto mem estas malmulte uzata ekster la greka]
- etoso [greke ήθος = moro - "etiko" devenas de ĝi - sed mi ne scias kiu lanĉis ĝin en Esperanto, kie ĝi tre prosperis en senco, kiun en aliaj lingvoj oni esprimas per metafora uzo de "atmosfero"]
- iĥtiokolo [greke ιχθυόκολλα = fiŝgluo - kie Zamenhof trovis tiun vorton, mi ne scias, sed ĝi estas Fundamenta]
- pri [la prepozicio; ekzistas samsona prepozicio en la rusa, sed la senco de la esperanta "pri" pli kongruas kun la greka περί = "ĉirkaŭ, koncerne". Male, nura hazardo estas la koincido de "po" kun unu el la sencoj de la greka από; tiu ĉi uzo de από ne estas antikva, kaj Zamenhof certe ne sciis pri ĝi, dum la rusa prepozicio по havas ankaŭ tiun sencon.]
- -id- [la prefikso; ekzistas forme kaj sence identa sufikso en la greka; "Nereidoj", ekzemple, estis en mitologio la filinoj de Nereo, "Atreidoj" la filoj kaj prafiloj de Atreo, ktp.]
- -ej- [la prefikso; ekzistas forme kaj sence identa sufikso en la greka, ekz. Ασκληπιείον = "kultejo de Asklepios, dio de kuracarto", aŭ Μαυσωλείον = "monumenta tombo de Maŭsolos, tirano de Halikarnaso", kaj metafore, ĉia maŭzoleo; tamen oni ne forgesu pri la samsignifa germana sufikso -ei, kiel en la vortoj Putzerei aŭ Konditorei.]

07-4 Ter gelegenheid van het UK in Japan werden in de vorige aflevering oude Japanse gedichten besproken. Ditkeer is een modern gedicht aan de beurt.

JAPANAĴOJ (2)

1) VORTPROVIZO

AMUZCENTRO	
Brilante ĉenas[1] orde parkitaj[2] aŭtoj, milde plenplenas[3] sunlumo, distingiĝas knabinaj ravaj[4] fajnhaŭtoj. Aer' serenas, parfuma nuko[5] perlas, modo tiranas en amuzcentra fluo[6], fraŭlinoj snobecon lernas. La milda lumo naskas[7] l'amon de l'aŭtuno, en film' brakumo[8] logas[9], sopiras[10] sentumo[11] de l' fraŭlin' al amindumo[12].	*1 vormt een ketting* *2 parkeren* *3 is boordevol, overvloedig* *4 verrukkelijk* *5 nek* *6 stroom* *7 baart* *8 omarming* *9 lokt* *10 verlangen* *11 senso, zin(tuig)* *12 het flirten*

Moderna poemo el "Lazur' kristala kaj pluv' susura" de **Masayuki Kuroda** (p. 51). Originale verkita en Esperanto. La aŭtoro naskiĝis en 1909. Esperantisto ekde 1949.
Li premiiĝis en Belartaj konkursoj.

--- O ---

Kuroda priskribas en la poemo "amuzcentron", kio estas tio?

unu aŭ pluraj konstruaĵoj, kie oni ofertas al la publiko multajn distraĵojn.

Ofte tia centro havas ludhalon[1]. Kiaj ludiloj troviĝas tie?

precipe[2] elektronikaj ludiloj.

Ĉu eblas danci tie?

Ne ĉiam estas ankaŭ dancplanko[3]

Ĉu eblas manĝi kaj trinki tie?
(drankgelegenheid, fastfoodrestaurant, snack-bar)

ne mankas trinkejoj kaj rapidlunĉejoj, (manĝetejojn, rapidmanĝejoj)!

Tie troviĝas ankaŭ disdon-aŭtomatoj, kiucele?
(cigaretten, snoep, softdrinks, bank)

por ke la publiko povu aĉeti cigaredojn, bombonojn, limonadon au aliajn refreŝigaĵojn.

kaj se oni forgesis sian monon hejme?

ankaŭ bank-aŭtomatoj aŭ mon(o)-aŭtomatoj estas surloke.

Per kiu detalo ni ekscias, ke en la amuzcentro de la poemo estas ankaŭ kinejo?

en film' ...

Per kiu detalo ni ekscias, ke tiaj amuzcentroj altiras amason da gejunuloj?

la aŭtoj ĉenas

Ankaŭ ĉe ni kreiĝis tiaj amuzcentroj. Kiel gejunuloj faris antaŭe por amuziĝi?

Ili iris al foiroj, al kermesoj.

Ree al la poemo:
Kp. la ĉeftemojn de la tri strofoj: ĉu estas ia rilato inter ili?

◇ *1a strofo*: la kadro de la alveno
2a strofo: la homoj, precipe la fraŭlinoj,
la etoso[4]: socialaj sentoj (modo, snobeco)
3a strofo: intimaj sentoj

◇ alia rilato: alveno, → en la centro plenaere[5], → ene de kinejo.

◇ kroma konstrulinio estas, ke ĉiu strofo komenciĝas per detalo pri la medio[6] por transiri al la priskribo de la fraŭlinoj.

Brilante ĉenas aŭtoj...: Per kiuj detaloj ni ekscias, ke la aŭtomobiloj estas bone prizorgataj?

Ili estas *orde* parkitaj kaj havas brilajn partojn, kromiitajn aŭ ne.

Kiuj partoj de aŭto plej ĝenerale estas tegitaj[7] de kromio[8]? *(bumpers, autoruiten, achteruitkijkspiegels; koplampen)*

la bufroj, la kadroj de la glacoj, la retrospeguloj, la reflektoroj

Kion sugestas la fakto, ke la aŭtoj 'ĉenas'?

la publiko venis multnombre, la aŭtoj staras bufro kontraŭ bufro.

Testu vin! *Relegu la tekston kovrante alterne la markitajn partojn kaj la nemarkitajn. Reesperantigu la subajn vortojn kaj uzu ilin en kunteksto.* 1 speelhal 2 vooral 3 dansvloer 4 stemming, sfeer 5 in de open lucht 6 milieu 7 bedekt (overtrokken) 8 chroom

Kion la termino[9] 'brilante' aldonas al la etoso?

| Ne temas pri malriĉa junularo. La veturiloj estas purajn bone flegitiaj. Ĉiuj sin pretigis por festo.

En poemo la vetero ofte respegulas la etoson. Ĉu ankaŭ ĉi tie?

| Jes: la suno plenplenas (verso 3). Ĉi tie, neniu ŝtormo, neniu tertremo[10]. La bela vetero invitas al ĝuado[11], promesas amuziĝon.

Knabinaj ravaj fajnhaŭtoj (verso 5). Kio en tiu ĉi strofo estas por la aŭtoro 'la kremo sur la glaciaĵo'[12]?

| Precipe la junulinoj, kiuj elaŭtiĝas, altiras lian atenton kaj lian admiron.

Priskribo de la haŭto:

| fajna[13] (kiel fajna oro), ŝminkita

(Plie pri 'fajna': vidu apude **noton 1**)

Kia ni povas imagi al ni la fajnan haŭton de tiuj junulinoj?

| freŝa, sen sulketoj[14], parfumita, glata, supla...

La junulinoj sin ŝminkas per ...

| belec(o)kremo, kosmetikaĵo, ŝminko.

Parfuma nuko perlas (verso 7): kial 'perlas'?

| pro la kolieroj.

Diferenco inter koliero, kolĉeno kaj ĉirkaŭkolo=?

| PIV: koliero = ornama kolĉen(et)o
| kolĉeno: ĉeno, portata ĉirkaŭ la kolo kiel efektiva aŭ simbola ligilo[15]. Ekz.: kolĉeno de oficistoj, de dresita urso[16]
| ĉirkaŭkolo: 1) = koliero; 2) ligilo ĉirkaŭ la kolo de besto

(Plie pri 'ĉeno': vidu sube 'Noto 2: ĉeno')

La vorto 'nuko' estas uzata en kelkaj esprimoj, ekz.: a) iu 'klinas la nukon antaŭ iu alia' = ? *(gehoorzaam, nederig, onderdanig, ondergeschikt)*

| ŝi/li estas obe(em)a, humila, subeca, subula

b) male, se iu 'ne facile klinas la nukon', ŝi/li estas *(stijfhoofdig , hardnekkig, weerspannig)*

| obstina, malmolnuka, rigidnuka,

c) alia esprimo: 'Sur lia nuko sidas pli ol peruko[17]' = ?

| li estas inteligenta.

'Modo tiranas' (verso 8). Ĉu nur en amuzcentroj?

Jen difino de 'modo' en PIV: "Nedaŭra, kaprica kutimo, moro[18] aŭ maniero, koncernanta precipe vestadon".

Testu vin! Modo = nedaŭra, ka... ku..., mo... aŭ ma..., koncernante pre...

'fraŭlinoj snobecon lernas' (verso 10)

Jen difino el PIV: "Snobo= homo, kiu konstante, senpripense kaj sendistinge admiras kaj imitas ĉion, kion ŝi/li opinias laŭmoda".

Testu vin!: "Snobo= homo, kiu kons..., senpri... kaj sendis... ad... kaj im... ĉion, kion ŝi/li opinias /...".

Interkrampe dirite: Esperanto havas nur kvar vortojn, kiuj komenciĝas per 'sn-'. Ĉu vi konas ilin?

| snajpero[19], snejlo (ne rekomendita vorto por 'gastropodo'[20]), snobo kaj snufi[21]

Noto 1: fajna.

Kia estas fajna oro, fajna arĝento?

| altkvalita, tre pura

Kiuj aliaj aĵoj povas esti fajnaj, ekstrakvalitaj, pursubstancaj? *(linnengoed, marmer, wijn, edelsteen, ...)*

| tolaĵo[22], marmoro, vino, (juvel)ŝtono, ...

Kion tiam signifas 'fajna plado'[23], 'fajna manĝaĵo'?

| ne nur bongusta, sed delikata, subtila

Kaj 'fajna orelo'?

| orelo kapabla distingi malfacile distingeblajn diferencojn, orelo de muzikamanto

Kaj kio estas 'fajna gusto' (en kuirejo, en artoj, en vendejo, ...)?

| de bona ĉefkuiristo[24] , de arta kritikisto, de bone edukita kliento, ...

Ĉu eblas fajnigi ies aŭ sian propran guston?

| Laŭ iuj jes, per la bona ekzemplo.

Testu vin! *Samaj ekzercoj*

9 (vak)term 10 aardbeving 11 het genieten 12 de kers op de taart 13 fijn 14 rimpels 15 band 16 getemde beer 17 op zijn nek zit meer dan een pruik = hij is verstandig 18 zede 19 sluipschutter *(angle: sniper)* 20 buikpotige 21 snuiven 22 linnengoed 23 gerecht, schotel 24 eerste kok

Noto 2: Ĉeno. *Ni parolis pri kolieroj kaj kolĉenoj. 'Ĉeno' estas multe uzata en kunmetaĵoj kaj kiel prefikso:*

Klarigu, kio estas <u>ĉenbutiko</u>. *(difinoj el aŭ laŭ PIV2)*

> Ĉenbutiko estas butiko, kiu apartenas kun pluraj aliaj al la sama entrepreno.

Klarigu, kio estas <u>ĉenfumanto</u>.

> Iu, kiu fumadas cigaredojn senĉese, ekbruligante[25] unu ĉe la stumpo de la alia.

Klarigu, kio estas <u>ĉenkanto</u>.

> Senakompana voĉa kanono je la unisono.

Klarigu, kio estas <u>ĉenlaboro</u>.

> Laboro ĉe ruliĝanta stablo[26], ĉe kiu ĉiu laboristo faras nur unu solan kaj ĉiam la saman manipulon.


Klarigu, kio estas <u>ĉenletero</u>.

> Letero, kies tekston - ofte preĝo[27] aŭ monpeto[28] - la adresulo devas rekopii kaj plu sendadi al pluraj korespondantoj.

Klarigu, kio estas <u>ĉenreakcio</u>.

> Procedo, ĉe kiu unu reakcio kaŭzas tuj plian reakcion ktp.

N.B. <u>procedo, proceso, procezo.</u>



Klarigu, kio estas <u>ĉenstablo</u>.

> Aro da moviĝantaj stabloj kunigitaj kiel longa ĉeno. La ĉeno prezentas al la sinsekvaj laboristoj la aĵon, kiu devas esti prilaborata.

Klarigu, kio estas <u>kuplĉeno</u>.

> Ĉeno, kiu kuplas du <u>dentradojn</u>, ekzemple ĉe biciklo.

Klarigu, kio estas <u>montoĉeno</u>.

> Aro da sinsekvaj interligitaj montoj.

Klarigu, kio estas <u>nutroĉeno</u>.

> Natura ciklo de la organismoj, en kiu ĉiu estas manĝata de iu el pli alta nivelo (laŭ Grote Prisma Nederlands).

Klarigu, kio estas <u>ĉensegilo</u>[28a].

> Mekanika ĉeno, provizita per dentoj por segi arbojn, ŝtipojn[29] kaj similajn.

Klarigu, kio estas <u>trogĉeno</u>.

> N.B. Trogo[30] = granda pelvo[31]
> Ĉeno kun trogoj uzata en akvomaŝinoj.

Klarigu, kio estas <u>ĉenkolizio</u>[31a].

> Sinsekvo de kolizioj, en kiu ĉiu el ili kaŭzas la sekvantan.

Paroliga ekzerceto:

Provu rediri la suprajn difinojn!

Tria strofo

Kiel kompreni '<u>l'amon de l'aŭtuno</u>' (verso 12)?

> 'la aŭtuna amo'. Kp.: l'amon de l'aŭtuno / la amo al iu, al io.

Kia <u>etoso</u>[32] <u>regas</u>[32a] en la aŭtuna kinejo?

> Etoso romaneca, sentema.

Romaneco[33] estas karakterizata per ...

> tendenco al fantaziado, <u>revemeco</u>.

N.B. Kp. revi, sonĝi.

> revi: <u>imagi</u> tion, kion oni forte deziras.
> sonĝi: vidi kaj senti image dum la dormo.

ŜERCE pri modo kaj vestado.

<u>Kostum-efekt'</u>= Kostum-efekt' dependas plene de kiu estas ene.

(R. Schwartz, "... kun siaspeca spico", p. 80).

<u>N.B.</u> efekto /efiko

effect	------→ *indruk*	efekto
	------→ *uitwerking*	efiko

<u>Modo</u>= Provokita epidemio, kio pruvas, ke epidemioj povas esti provokataj (G.B. Shaw).

<u>Modo</u>= Afero tiom malbela, ke oni daŭre devas ŝanĝi ĝin (Oscar Wilde).

Kontraste al la supra temo:

<u>Nudisto</u>= Iu, kiu havas la avantaĝon ne devi etendi la manon por kontroli ĉu pluvas (Tom Pepe).

Preskoboldoj[34] *Korektu kaŝante la grizan fakon!*

en amuzcentra gluo	fluo
parfuma nuko peklas	perlas
surnuke kolero perlas	koliero
glata haŭto sen ŝinko	ŝminko
parfumaj nuloj perlas	nukoj
ranaj[35] knabinaj haŭtoj	ravaj
kolĉeno de presita ruso	dresita urso
en amuzcentro modo tizanas	tiranas
obstinulo ne klivas[36] la nukon	klinas[37]

Testu vin! *Samaj ekzercoj*

25 aansteken 26 werkbank, stellage, schraag
27 gebed 28 *mono-peto* geldaanvraag
28a kettingzaag 29 houtblok 30 trog, bak
31 kom, bekken 31a kettingbotsing 32 sfeer
32a heerst 33 het romantische
34 zetduiveltjes 35 *rano*: kikker 36 kloven
37 buigen

Prepozicioj		
	la kremo -- la glaciaĵo	sur
	klini la nukon -- iu alia	antaŭ
	bufro tegita -- kromio	de
	ĉeno provizita -- dentoj	per
	kontraste -- supra temo	al
	laboro -- ruliĝanta stablo	ĉe
	sin ŝminki -- belecokremo	per
	la strofo komenciĝas -- detalo	per
	la amo de gepatroj -- la infanoj	al
	romaneca tendenco -- fantaziado	al

---

2) UITWERKING VERTAALOPGAVE 2007-3

Pas op, een topverkoper (Mark van Baal, *Elsevier, 9 september 2006).*

Atentu, supervendisto.

